


Votre revue de l'Association Pour l'Espéranto

N° 2 - 2017

★
Espéranto
en
Marche



UNIVERSALA KONGRESO DE UEA EN SEULO : 22-29 JULIO 2017



Enhavo

- Paĝo 2-3-4 : Provizora Protokolo de la Ĝ.A. de BEF en Bruselo.
(En salono Casablanca de PianoFabriek 18/03/2017).**
- Paĝo 5-6 : Bonvenon al la Kongreslando : KOREIO**
- Paĝo 6 : Provizora programo de la UK en Seulo**
- Paĝo 7 : Trezoro de nia Biblioteko : Lt. Ch. LEMAIRE .
« Critique acerbe du Volapük » [1898].**
- Paĝo 8 : Prononco de la hispano litro « J » (la jota).**
- Paĝo 9 : La Reĝo de la Frenezuloj (Roland Magdane)**
- Paĝo 10 : Informoj pri Esperanto.**
- Paĝo 11 : Informoj pri Esperanto en Valonio.**
- Paĝo 12 : Kotizoj 2017 por APE kaj UEA. Abono al Eo-Info.**

Editeur responsable: Claude Glady
Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE BELGIO
00-32-(0)71/64 49 16 cglady@arcadis.be

BELGA ESPERANTO FEDERACIO

aliĝinta al UEA

defakta asocio

ĜENERALA ASEMBLEO DE BEF

Provizora malneta raporto

Dato : Sabaton, 18-an de marto 2017. Je 13h30..

**En salono Casablanca (2a etaĝo) - De PianoFabriek Rue du Fort 35 Fortstraat
1060 BRUSELO (Saint Gilles/Sint Gillis)**

**Ĉeestas 23 partoprenantoj : Flory WITDOECKT (BEF), Eric BAERT (BEF), Claude GLADY (BEF), VERCAMMEN Ivo (FEL), Rakoen MARTENS (FEL), Hans DELNAT (FEL), Katja LODOR (FEL), Nicky JANSSEN (FEL), Roland ROTSAERT (FEL), Griet SYMOENS (FEL), Ivo DE KEYZER (FEL), Walter VAN DEN KIEBOOM (FEL), SOSSOIS Georges (APE), Bernadette PONCELET (APE), DE MEYERE Hubert (APE), Eric NEMES (APE), SPARENBERG Jean-Pol (APE-VS), Valère DOUMONT (APE-VS), DE BUYL J-M Nikolao (EBG), Bernard Régis LARUE (EBG), SPERBER Francine (EBG), Dina DELOYER (EBG), Clara BRACKE (BEFA),
Senkulpiĝis : Marc CUFFEZ (FEL), Eduard KUSTERS (FEL).**

Prezidas: Flory WITDOECKT (Prezidantino).

- 1. Flory konstatas unue ke tiu PianoFabriek, proksime de la suda Stacidomo estas taŭga loko por kunveni ! Ŝi informas ke Marcel DELFORGE telefonis por diri ke li decidis rezigni pri ĉiuj funkcioj en BEF kaj deziras de nun nur plupartopreni la agadojn en la Grupo de Marcinelle. Estas tamen problemo por ni ĉar li estas oficiale ĉefdelegito de BEF. Ĉu li intencas ankaŭ demisii por tiu tasko ? Kaj, se jes, kiu reprenos la taskon ? Sed Marcel multe aktivis por BEF, kaj do Flory proponas ke ni kolektu iom da mono por ke la Grupo de Marcinelle aĉetu donacon (dolĉaĵojn ?) je la nomo de BEF. Ĉiuj konsentas ! Ni kolektos la monon, fine de la kunveno !**
- 2. La sekretario normale protokolas kaj la listo de la ĉeestantoj cirkulas.**
- 3. La raporto de la ĜA de BEF de 19/03/2016 estas unuanime aprobita sen rimarko..**
- 4. KASISTA RAPORTO :
Eric BAERT donas la raporto al Flory, kiu komentas iomete la sumojn.
Ni havas du ŝparkontojn, ĉe UEA (8000 €) kaj ĉe FEL (3000 €), kaj restas 1746,88 € sur la kuranta konto Bpost. Pasintjare, ni ne multe uzis tiun konton.
Ni devas ankaŭ konstati ke la ŝparkontojn raportas malmulte da mono (ĉ. 1% !)**
- 5. FUNKCIADO DE BEF :
Flory unue rakontas pri ŝia vojaĝo en Barcelono.
Sed ŝi sin demandas, ĉar ŝi aĝas, kiom da tempo ŝi ankoraŭ povos tiel funkcii por BEF kaj EEU. Ni devus pripensi pri la estonto !
La sekretario volas substreki ke ekzistas problemo rilate al la kuranta konto ĉe Bpost!
Ŝajne, nur du subskribantoj rajtas funkciigi tiun konton : Eric kaj Marcel, ambaŭ sufiĉe aĝaj kaj kun sanproblemoj. Kio okazos kun la mono se ili ne plu povos interveni ?
Peti al la Poŝtbanko modifii la responsulonjn, prenos multe da tempo, des pli ke tiu konto estis malfermita kun la statutoj de BEF kiel Asocio Sen Profita Celo, kaj nun BEF estas defakta Asocio !
Propono : Meti la tutan sumon en la konton de BEF ĉe FEL kaj simple fermi la konton ĉe Bpost. Flory kaj Claude prizorgos tiel la konton kun FEL.
La propono estas akceptita kun unu sindeteno.**

6. INFORMADO PRI LA AGADOJ DE LA GRUPOJ :

FEL : Nicky kaj Ivo unue prezentas la novan domon de FEL Cyreen Knokaert estas la nova sekretario, kiu okupiĝas ankaŭ pri la Biblioteko. FEL organizis sukcesan Beneluksan Kongreson. Aperas demando por scii kiaj estas la rilatoj kun la loka grupo Verda Stelo ? Ĝi estas bonaj kaj la Verda Stelo kunvenas nun en la nova ejo eĉ se okazas kelkfoje homaj problemoj ! Multaj personoj el la tuta Flandrio helpis la instaladon.
Propono : Ankaŭ BEF helpu por la instalado de la noba Eo-domo kiu vere servos al ĉiuj !
Oni proponas donacon de 2000 €. Unuanime akceptita !!

APE : Bernadette konstatas ke ekzistas nur du realaj kluboj en APE. En Marcinelle kaj Tilff. Aliloke, kelkaj individuoj klopodas malfacile aktivi. En 2016, 61 membroj pagis por APE, ne per klubo sed individue. Nia informbulteno "Esperanto en Marche" aperis kvarfoje kiam tio valoras. Nia retejo regule funkcias. Kaj nia biblioteko estas teorie akcesebla. Nia Ĝenerala Asembleo okazis en Montzen je 15/10/2016. Bedaŭrinde, malmulte da membroj ĉeestis. La protokolo aperis en EeM_4_2016.

EBG : Bruselo pluvivas sed nia membraro konstante malkreskas. Ni havas problemojn por regule eldoni nian revuon "Aktuala" prefere nun en reta versio. Eĉ la Biblioteko malbone funkcias : la libroj estas sur la ŝtuparo de Nikolao. Nia projekciilo estis ŝtelita. Tamen pludaŭras la prelegoj kaj la du kursoj. Ni ankaŭ organizas babilemajn spagetojn.
Ni tamen intencas organizi la venontan Zamenhoffeston en Bruselo.

BEFA : Ni ankaŭ perdas membrojn kaj s-ro Hennaut forpasis. Kunveniĝas malmulte da fervojistoj, sed laŭ la fervojistaj statutoj, nur ili rajtas ricevi apogon kaj lokon far la fervojoj. Estus do fino post 2017. Ni vidis la eblecojn en majo en la venonta Kongreso de IFEF en Colmar.
Oni povas aliĝi individue al IFEF, sed ni ne povos pli esti nacia movado de BEFA.

ILEI : S-ro Cuffez vojaĝas. Li regule informas per la reto. ILEI eldonas du revuojn : « Pedagogia Revuo » por la instruistoj kaj « Juna Amiko » por ĉiuj sed cele al la junuloj.

7. UEA kaj EEU : la landaj asocioj devas repagi por ĉiu membro, 1,28 € por UEA kaj 1 € por EEU. Kutime estas FEL kiu kunigas la monon kaj efektivigas la pagon por BEF. Ni devas scii ke la membroj de EEU estas la eŭropaj landoj, sed eŭropaj responsuloj kelkfoje persone partoprenas la kunvenojn. EEU regule eldonas la revuon "Eŭropa Bulteno" elŝutebla en la reto.
La venonta Kongreso de EEU okazos en Freiburg dum la landa kongreso.

8 kaj 9 : VERDAJ SKOLTOJ kaj PEKO 2017.

Valer raportas pri la Verdaj Skoltoj kaj pri PEKO. Tiuj raportoj estas konsulteblaj sur la reto.
La sekretario povas sendi tiun raporton se oni faras la peton.

10, 11, 12, 13 : Neniu rimarko aŭ ŝanĝo. La estraro plurestas.

14. DIVERSAĴOJ :

- 1) Georges insistas pri grava memoraĵo : Zamenhof forpasis antaŭ 100 jaroj. Oni celebras tion en la Pola Parlamento. Ni devas profiti la eventon por informi pri Esperanto. FEL anoncis 10% rabaton por la libroj de Zamenhof.
- 2) Ŝajnas esti datreveno de la unua Eo-kurso en Gilly. Oni parolas pri libro rilate al Historio de Esperanto en Charleroi kaj klopodoj de ĝemeliĝo kun tiu urbo. Temus pri iu Willy Ernst sen alia informo !
Necesas sendi resumon de tiu kurioza afero al la sekretario kiu disdonos la informon (?).
- 3) Propono de Valer : organizi konkurson far BEF por elekti la belgan esperantiston de la jaro.
Por subteni kandidaton, sendi tekston al la sekretario.
- 4) Nicky invitas al la baldaŭa malfermado de la nova ejo de FEL. Verŝajne en junio, konfirmo en la revuo Horizontaal.
- 5) Flory denove proponas organizi komunan Z-feston, elektante vice la tri regionojn, prefere semajnfine kaj tagmeze. Nikolao diras ke ĉi-jare, ĝi okazos en Bruselo. BN : la profitoj iros al la klubo kiu organizos.
- 6) Proponi denove organizadon de Beneluxa Kongreso.
- 7) Ĉiu grupo povus sendi reprezentanton en BEF por plibonigi la rilatojn inter la diversaj grupoj.



GENÉRALA ASEMBLEO DE BEF EN BRUSELO 18/03/2017



GENÉRALA ASEMBLEO DE BEF EN BRUSELO 18/03/2017



GENÉRALA ASEMBLEO DE BEF EN BRUSELO 18/03/2017

Bonvenon al la kongreslando

Ĝenerale

Bonvolu noti, ke la reguloj pri donado de vizoj malsamas laŭ landoj kaj ke ili konstante ŝanĝiĝas. Tial bv. nepre mem kontroli ĉe la plej proksima diplomatia reprezentejo de Korea Respubliko (bv. mem trovi ĝian adreson en via ĉefurbo aŭ najbara lando), ĉu vi bezonas vizon kaj sub kiuj kondiĉoj. Korea Respubliko havas interkonsenton pri senvizaj vojaĝoj kun 155 landoj (2016). CO/LKK ne povos helpi pri vizpetoj faritaj post la 1-a de majo 2017 kaj principe ne povos respondi al tiuj petoj.

Dokumentoj

Ĉiu vizitanto devas havi pasporton validan plu minimume ses monatojn post la forirdato, koncernan vizon, samkiel revenbileton. La kongresanoj mem devas zorgi pri akiro de vizoj. En esceptaj kazoj oni povas peti helpon de la CO/LKK.

Konfirmiloj kaj invitleteroj

Normale la Kongresa Konfirmilo devas sufiĉi por pruvi la kongresanecon al la vizdona instanco. La konsulejoj povas postuli oficialan invitleteron, kiun la CO sendos se oni petos ĝin. Al nealiĝintoj oni ne povas sendi invitleteron nek aliajn konfirmilojn. Bonvolu konscii, ke nek la CO nek LKK povas influi la decidojn de la konsulejoj.

Datoj

Bv. noti, ke la invitletero povas teksti nur por la periodo de la oficiala kongresdaŭro (22-a ĝis 29-a de julio, eventuale plus la daŭro de menditaj antaŭ- kaj/aŭ postkongresoj). Se vi bezonas pli longan restadon, tion vi devas aranĝi private.

Mongarantioj kaj asekuroj

Senkonsidere ĉu oni havas aŭ ne la vizon (depende de la civitaneco), necesas pruvi ĉe la eniro en la landon, ke oni posedas sufiĉajn monrimedojn por la restado. Al kongresanoj, kiuj mendis kaj pagis loĝadon pere de UEA (aŭ venas je aparta invito de UEA), oni povas sendi, se necese kaj laŭ peto, konfirmon pri la pagitaj servoj. Tio povas parte kompensi la postulon pri posedo de sufiĉaj monrimedoj. UEA kaj LKK ne donas financajn garantiojn al kongresanoj. Kongresano mem devas pruvi al la vizdona instanco posedon de sufiĉaj rimedoj por restado en la kongresa lando. Unu el la postuloj por ricevi vizon estas akiro de asekuro, pri kio la kongresanoj zorgu mem. Ofte tute taŭga asekuro estas aĉetebla en via hejmlanda flughaveno.

Sendepende de tio, ĉu necesas havi vizon aŭ ne, ĉiu kongresano prefere asekuru sin por la tuta daŭro de la vojaĝo kaj restado.

Alveno al Seulo kaj al la kongresejo

Aviadile. Asiana Airlines, la oficiala flugkompanio de la kongreso, havas bonajn konektojn kun multaj urboj de la mondo. Proksime de Seulo estas du internaciaj flughavenoj – Incheon (ICN) kaj Gimpo (GMP). La bonveniga servo funkcios ĉe la flughaveno Incheon la 22-an de julio.

En la flughaveno Incheon oni povas preni flughavenan trajnon ĝis la trajna stacio Seulo (서울역 – Seoul Station) kaj tie ŝanĝi al la metrolinio 1 (direkte al Soyosan) ĝis la haltejo de la kongresejo, Hankuk University of Foreign Studies (외대앞역 – HUFS); la tuta vojaĝo daŭras inter 1h15 kaj 2h00, depende de la

elektita trajno el la flughaveno kaj de la rapideco ŝanĝi de la trajno al la metroo, en la stacio Seulo.

La kostoj de la vojaĝoj inter la flughavenoj kaj la kongresejo varias jene:

1) El ICN: 4850 ŭonojn (ĉ. 3,9 eŭrojn) por la normala trajno kaj la metroo, per la sama bileto;

2) El ICN: 8000 ŭonojn (7500 ŭonojn se el la aŭtomato; 6000 ŭonojn p.p. se por pli ol du homoj vojaĝantaj kune; 6900 ŭonojn por infanoj ĝis-12-jaraj) por la ekspresa trajno plus 1850 ŭonojn por la metrobileto (aĉetebla en la stacio Seulo);

3) El GMP: 2250 ŭonojn (ĉ. 1,8 eŭrojn) por la normala trajno kaj la metroo, per la sama bileto. La vojaĝodaŭro estas ĉ. 1h30.

Oni povas ricevi la 500 ŭonojn de la kaŭcio de la unufoja metrokarto, se oni redonas ĝin al la redonmaŝino, en la halo de la alvenstacioj.

Eblas atingi la urbon kaj la kongresejon ankaŭ per taksioj kaj busoj.

Prame. De Ĉinio kaj Japanio oni povas atingi Koreion prame. De Ĉinio la pramoj alvenas al la korea haveno Incheon, en

kiu oni povas preni buson 12 aŭ 24 ĝis la metroa haltejo Dongincheon (동인천역) kaj tie preni la metrolinion 1 ĝis la haltejo HUFS; la tuta vojaĝo povas daŭri ĉirkaŭ 2 horojn. De Japanio la pramoj alvenas al la urbo Busan, de kie oni povas atingi la trajnan stacidomon Seulo post 3-hora veturo per la KTX-trajno (la bileto kostas 59800 ŭonojn). Vidi ĉi-supre kiel iri metroe de la stacio Seulo ĝis la kongresejo.

La kongresejo troviĝas je ĉ. 200 metroj de la metroa haltejo HUFS (eliroj n-ro 1, 5 aŭ 6) fine de la strato Hwiggyeong-ro.

**Eltiraĵo el la DUA BULTENO !
Elŝutebla el la reto**

La kongresejo

Hankuk Universitato de Fremdaj Studoj (한국외국어대학교, HUFS), Imun-ro 107, Dongdaemun-gu, KR-02450, Seoul.

Por kongresrilataj aferoj bv. ne skribi al la kongresejo sed nur al la konstanta adreso de UEA en Roterdamo (p. 24).

Provizora programo

Ĉi tie aperas nur la plej gravaj programeroj. La Estraro de UEA rezervas al si la rajton fari ŝanĝojn.

Sabato, 22 julio. Malfermo de la kongresejo je 9h00. Alveno de la kongresanoj kaj registriĝo. Disdonado de dokumentoj. Komitato de UEA. Unuafojaj Kongresanoj. Libroservo. Movada Foiro/Interkona Vespero. Giĉetoj funkcias ĝis 18h00.

Dimanĉo, 23 julio. Solena Inaŭguro (10h00). Libroservo. Inaŭguro de IKU/AIS. Kongresa Temo. E-kursoj. Korea Eksprese. Nacia Vespero.

Lundo, 24 julio. Libroservo. IKU-prelegoj. E-kursoj. Kleriga Lundo. Korea eksprese. Teatro. Bankedo. Kongresa Balo.

Mardo, 25 julio. Libroservo. E-kursoj. Tago de Lernado. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Estraro respondas. Landa

Agado. Delegita Reto. Societo Zamenhof (nur por membroj). Teatro.

Merkredo, 26 julio. Tuttagaj ekskursoj. Kongresejo fermita.

Ĵaŭdo, 27 julio. Libroservo. Libroj de la Jaro. IKU-prelegoj. Kongresa Temo. Esperantologia Konferenco. Korea eksprese. Belartaj Konkursoj. E-kursoj. Centra Oficejo respondas. Urba Akcepto (por invititoj). Koncerto.

Vendredo, 28 julio. Libroservo. Komitato de UEA. IKU-prelegoj. E-kursoj. Faka Forumo. Aŭkcio. Venontaj UK-oj. Internacia Arta Vespero.

Sabato, 29 julio. Solena Fermo (10h00). Libroservo (ĝis 14h00). Fermo de la kongresejo (14h00).

TREZORO DE NIA BIBLIOTEKO

Nia biblioteko posedas la libron verkitan far Leŭtenanto Charles LEMAIRE. Tiu interesa libro estis eldonita en 1898 en Bruselo, sub la titolo :
« L'ESPERANTO, solution triomphante du problème de la Langue Universelle ». Ni povas trovi en paĝo 13, sarkasman kritikon de Pastro Schleyer, inicianto de la lingvo VOLAPŬK en 1885 :

.....

Or, le nom même du Volapük est un mystère pour les linguistes non initiés; ses mots peuvent à peine se retenir tant ils sont étranges, se prononcer tant ils sont scabreux. D'où provenaient de telles tares? De ce que le créateur du Volapük avait adopté la malheureuse idée de créer cet organe de toutes pièces, sans y rien mettre de nos langues.

Ce système a-priori devait dérouter par sa nouveauté absolue, et, si simple qu'on pût ou voulût le supposer, écraser la mémoire! C'est ce qui arriva, Car le procédé du Volapük était absolument illogique, ainsi que le prouvent à l'évidence quelques exemples.

Volapük, qui a intrigué tant de gens, est formé de vola, génitif de vol, mot tiré de l'anglais world, univers; pük signifie langage, de l'anglais speak:

Total: Volapük, langue de l'univers.

Le mathématicien grec se traduit en Volapük par gletavel glikik, d'après les considérations suivantes; : Glet, de l'anglais great = grandeur; av, d'origine inconnue, désigne les sciences; el, de l'allemand er (!) indique la profession; glik, Grèce, vient de l'anglais greek: (pourquoi de l'anglais?); ik, désigne l'adjectif. On aurait pu penser que des mots aussi universellement connus que «mathématique» et «grec» pouvaient passer, avec des transformations de désinences tout au plus, dans n'importe quelle langue nouvelle !

Mais voici mieux, si possible! Sait-on ce que veut dire Melop en Volapük ?-

« Melop». c'est l'Amérique, et le mot a été formé comme nous allons dire.

L'abbé Schleyer prend au mot Europe sa finale op pour lui faire exprimer l'idée de continent en général. Puis il cherche dans le mot Amérique une syllabe qui en soit caractéristique; l'A est exclu comme se retrouvant dans Afrique, Asie, Australie, et M. Schleyer s'arrête à la syllabe mer. De sorte que Merop serait l'Amérique, Seulement, comme l'abbé Schley(er sait que les Chinois n'emploient pas l'r, il le condamne et le remplace par l (sauf certaines exceptions); mer devient mel, et l'Amérique devient melop, pour des raisons de la même haute importance, l'Asie devient Silop, l'Europe Yulop, l'Afrique

Fikop, et l'Australie Talop !

Il est impossible de qualifier pareils procédés de création de mots autrement que de puérils.

....

CHARLES LEMAIRE (1863-1926) (ELVIKIPEDIO)

Li naskiĝis la 26-an de marto 1863 en Cuesmes kaj mortis la 21-an de januaro 1926. Li estis oficiro kaj esplor-vojaĝisto en Meza Afriko (Kongolando), cetere unua direktoro de la Belga Kolonia Altlernejo. Zamenhof nomis lin « la vera patro de Esperanto en Belgio ». Lia dekjara (kvankam multe interrompita) propagando por la ideo de internacia lingvo estis certe pionira, sed ĝi finiĝis en direkto de la ido-skismo kaj en kompleta seniluziigo.

Li verkis plurajn librojn. Fine 1908, li forlasis la Esperanto-movadon.

Prononco de la litero « j » (la « jota ») en la hispana lingvo.

La fonemo « Ĥ » kiu ekzistas en Esperanto, ne estas ĉiam facile prononcebla por la franclingvaj parolantoj ! Ĝi iomete similas al iu sono « ro » skrapita en la gorĝo. Tiu sono ankaŭ ekzistas en la moderna hispana lingvo en vorto kiel « jardin » (ĝardeno).

Multaj homoj, eble ankaŭ vi, opinias ke por la hispana lingvo, tiu aparta uzo de la sono « jota » estas la konsekvenco de la araba influo kiu ekzistis en la suda parto de Hispanio dum pluraj jarcentoj. Efektive, pli ol 4000 hispanaj vortoj venas de la araba. Kaj do tia opinio ŝajnas evidenta.

Sed se vi iomete esploras la problemon, ekzemple en Vikipedio, vi konstatos ke ĉiuj seriozaj fontoj diras ke tiu prononco en la hispana lingvo nur vere aperis en la deksepa jarcento, kiam araboj jam de longe ne plu vivis en la regiono.

Ŝajnas do ke gravaj hispanoj kiel Cervantès aŭ la imperiestro Filipo la dua ne konis tiun uzon de la « jota » : plej probable ili prononcis la literon j kiel la sono « Ŝ ».

Despli ke evidentiĝas ke tia prononco de la « jota » nur aperis en la Kastilia dialekto kiu konsistigas la modernan hispanan lingvon. Ĝi tute ne ekzistas en la aliaj regionaj dialektoj, kiel ekzemple la Andaluzia, kie la araba influo tamen ekzistis pli daŭre.

Se estas unuanima konsento pri la fakto ke la prononco « rota » vere aperis antaŭ tri aŭ kvar jarcentoj, estas neniu konsento pri la kaŭzo de tiu evoluo de la sono de la litero « j ». Por kelkaj estus la influo de la keltoj, por aliaj de la vaskoj.

Kaj pluraj lingvistoj klarigas ke fakte estas nur normala evoluo de la prononco de tiu fonemo, kiun oni konstatas en kelkaj aliaj lingvoj.

En libro, kiun li verkis en 2005 [LINGVAJ BABILAJŬOJ], André Cherpillod prezentas alian propran klarigon de tiu evoluo en paĝo 134 de « la sono [ĥ] » :

En 1500, naskiĝis la filo de Filipo la Bela (Felipe el Hermoso), arkiduko de Aŭstrio, kaj de Johana la Freneza (Juana la Loca), reĝino de Kastilio. Tiu filo, Karlo, kiu poste iĝis fama sub la nomo Karlo la Kvina (Carlos Quinto, Carlos V), naskiĝis kaj trapasis sian tutan junaĝon en Gento, en Flandrio (nuna Belgio). Liaj instruistoj estis flandroj, kaj lia denaska lingvo estis la flandra. En 1516, post la morto de sia avo Fernando II^a de Aragono, li ekposedis la reĝlandojn de Kastilio kaj de Aragono. Sed tute certe, li tiam prononcis la hispanan lingvon kun la flandra akĉento.

Kaj estas sciante ke la flandra lingvo ne konas la sonojn [ĵ] kaj [ŝ]. Pro tio, tute spontane, la flandra nobelaro, kiu akompanis la reĝon en Madridon, prononcis, ekzemple, [ĥénte] la vorton gente, kiu ĝis tiam estis prononcata [ĵente] aŭ [ĝente].

La prononco [ĥ] de la hispana litero j estas do tute certe de flandra deveno.

Cetere, oni rimarku, ke Portugalio, kiu ne estis sub la regado de Karlo Va, ankaŭ ne suferis tiun fonetikan ŝanĝon : por "ludo", la portugaloj diras jogo [ĵógu], dum la kastilianoj diras juego [ĥŭégo]. Kaj la influo de la Kastilia Kortego ne etendiĝis ĝis la foraj provincoj : tial la katalunoj plu prononcis joc [ĵok], kaj la galegoj xogo [ŝógo] "ludo".

Ĉu la klarigo de André Cherpillod estas la bona ? Interesa problemo por nia nederlandlingvaj samlandanoj, ĉu ne ? Afero sekvenda !

LA REĜO DE LA FRENEZULOJ.

La mondo fariĝis granda psikiatria malsanulejo kie la stultuloj libere travagadas... Ĉiu lando elektis sian estron : la reĝo de la frenezuloj. Kaj por ke la reĝoj ne enuas, oni donis al ili ludilojn : soldatetojn, kamionojn, jetojn. Kaj la reĝoj de la frenezuloj de la tuta mondo invitas unu la alian por ludi. Dum malgrandaj manĝetoj, ili komparas siajn ludilojn:

- Ĉu vi vidis mian submarŝipon ?

- Kaj vi vidis mian kamionon !

Ĉiun vesperon, ili ludas tre malfrue... ili festenas.

Ili pelas siajn soldatetojn kiuj falas sub la rulglobetoj... Kiam ne pli estas, ili anstataŭas ilin... Kaj poste, la reĝoj de la frenezuloj interŝanĝas siajn ludilojn :

- Mi pruntedonas al vi mian petrolon, sed vi ja pruntedonas al mi vian neŭtronan bombon.

- Konsentite, donu al mi vian uranion kaj mi pruntedonos al vi miajn malgrandajn kamionojn da soldatoj.

Kaj poste, estas reĝoj kiuj havas nenion por interŝanĝi : nenion por ludi, ne eĉ sufiĉe por manĝi... Je la kvara, ili rajtas malgrandan manĝeton partigendan inter tri... Ili vivas per la triono... estas la tria mondo... Ili kuntrenas malantaŭ si, fine de ŝnureto, kuniklon kiu ludas la tamburon... Kaj vidante ilin pasi, la reĝoj de la frenezuloj de la tuta mondo ĵetas al ili, por distriĝi, malgrandajn kernojn de nuklea olivo...


Kaj poste, de tempo al tempo, alvenas kuracisto kiu volas flegi la stultulojn... oni nomas lin la Nobel-premiiton pri paco ! Oni metas al li sur la koron, dikan medalon kiu brilas en la sunlumo, por ke oni bone vidas la lokon kien necesas pafi por mortigi lin... kaj la vivo daŭras !

la reĝoj de la frenezuloj de la tuta mondo kunigas ĉirkaŭ si ŝtipkapulojn kiujn ili mem elektas : la unua ŝtipkapulo, la ŝtipkapulo de financoj, la ŝtipkapulo de armeoj, tio nomiĝas registaro. Kaj en la tuta mondo, la ŝtipkapuloj konsilas al la reĝoj de la frenezuloj por regi etkapulojn... kaj la etkapuloj... ne serĉu, ĉiam estas ni...!

Sed se la etkapuloj de la tuta mondo volis teniĝi per la mano, ni devigus la frenezulojn formeti iliajn ludilojn, iliajn tankojn, iliajn kanonojn, iliajn aviadilojn, kaj ni povus fine promeni paco en la ĝardenoj de la tero kiuj estas tiel beletaj kiam ni ne militas.

Rolando Magdane
(*El la franca*)

Ni kalkulas ĝis tri !



INFORMOJ PRI ESPERANTO

BELGA ESPERANTO FEDERACIO (BEF)

Prezidantino : S-ino Flory WITDOECKT (Oostende) 059 702 914 flory2@witdoeckt.be
Sekretario : S-ro Claude GLADY (Cerfontaine) 071 644 916 cglady@arcadis.be
Kasisto : S-ro Eric BAERT (Braine L'Alleud) 02 384 82 23 baert.eric@skynet.be

BEF (Defakta Asocio) estas kupola federacio, agnoskita far UEA, por la tri belgiaj regionaj grupoj : APE, FEL, EBG.

ASOCIO POR ESPERANTO (APE) Asbl

Honora Prezidanto : Marcelle DELFORGE mardelforge@brutele.be
Prezidanto : Georges SOSOIS 071 436 205 georges.sossois@gmail.com
Sekretariino : Bernadette PONCELET 087 398 570 bernadetteponcelet@skynet.be
Kasisto : Claude GLADY 071 644 913 cglady@arcadis.be
Eventoj : Valère DOUMONT 0485 517 552 doumontvalere@yahoo.fr
Promocio Eo : Hubert DEMEYERE 071 502 691 hubert.demeyere@gmail.com
Interreto : Patrice VAN DE VELDE 0478 251 419 patrice.vdvelde@gmx.com
Disvastigado : Guy BASYN 010 688 282 guy.basyn@skynet.be

FLANDRIO : FLANDRA ESPERANTO LIGO (FEL) vzw

Lange Beeldekenstraat 169 (2060 Antwerpen) 03 234 34 00
info@fel.esperanto.be www.esperanto.be

FEL eldonas la paperan revuon « HORIZONTALAAL » kaj la retan « VERTIKALE ».

BRUSELO : ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO (EBG) asbl/vzw

Françoise PELLEGRIN (Rhode-St-Gebèse) 02 358 27 28 franaz@esperantobruselo.org
Nikolao de BUYL (Koekelbergh) 0478 382 981 nikolao@esperantobruselo.org
Laurent LOISSE sekretario@esperantobruselo.org www.esperantobruselo.org
La Grupo eldonas la revuon « AKTUALA » : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>

VERDAJ SKOLTOJ asbl.

[www.verdajskoltoj.net]

info@verdajskoltoj.net

Jean-Pol SPARENBERG Prezidanto 0475/27 23 19 jpsparenberg@gmail.com

Valère DOUMONT Sekretario 0485/51 75 52 doumontvalere@yahoo.fr

Subteno al konto de V.S. : **BE25 9731 2584 2982** Ruelle de Thuin 20 B-6540 LOBBES

GROUPE DES CHEMINOTS : FERVOJISTOJ (BEFA)

Lucien DE SUTTER (BXL-Central) 058 501 825

Cours : 1er et 3ème mercredi, chaque mois de 13h30 à 16h00

INTERNACIAJ ORGANIZAĴOJ - ORGANISATIONS INTERNATIONALES

UEA : Nieuwe Binnenweg 176 NL-ROTTERDAM +31 10 436 1044 www.uea.org

SAT : Av. Gambetta, 67 FR-75020 PARIS +33 9 50 71 01 97 www.satesperanto.org

SAT-AMIKARO : Bd Vincent Auriol, 132 FR-75013 PARIS +33 9 53 50 99 58 www.esperanto-sat.info/

Ĉiuj informoj (en franclingva Belgio por UEA) ĉe la peranto Claude GLADY :
rue du CULOT, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916 cglady@arcadis.be

INFORMOJ PRI ESPERANTO EN VALONIO

CHARLEROI : KARLOREĜA GRUPO ESPERANTISTA (K.G.E)

Rudy COGNIAU (Châtelet) 0492 710 974
Mireille MARNETTE (Marcinelle) 071 324 733 marnette.mireille@skynet.be

LIEGE-ESPERANTO asbl

Denise MAILLET (Embourg) 04 365 15 23 denise.dupont@skynet.be

LOUVAIN-LA-NEUVE : « KVINFOLIO » asbl

André DEMARQUE (Wavre) 0486 516 085 ademarque@skynet.be

VIRTON : GAUME ESPERANTO

Gaby SIMEON (Saint-Mard) 063 571 204

SENLIME + VERVIERS (V.E.G)

Jean-Marie JACQUES (Verviers) 087 330 292 jacques@senlime.org
Jose JACOB (Polleur) 087 221 079

KELMIS (LA CALAMINE) : « AMIKEJO »

Mathieu SCHRYMECKER (La Calamine) 087 853 389

AUTRES VILLES WALLONNES - ALIAJ VALONAJ URBOJ

ATH Monique VAN ROY (Ellezelles) 068 542728
BINCHE Maxime LECHIEN (Vellereille) 064 337 826
CERFONTAINE Claude GLADY (Cerfontaine) 071/644 916 cglady@arcadis.be
COMINES J-C THUMERELLE (Warneton) 056 557 606 jcthum@gmail.com
GEMBOUX José VINCK (Gembloux) 081 613 016
MONS Edith COLAS (Saint-Symphorien) 065 313263
THUIN Jean-Pol SPARENBERG (Lobbes) 0475/272319 jpsparenberg@gmail.com

RETPAĜO - SITE INTERNET D'APE :

<http://esperanto-wallonie.be/>

Respondeculoj : <patrice.vdvelde@gmx.com> k <hubert.demeyere@gmail.com>

Por konsulti aŭ elŝuti ĉiujn lastajn Bultenojn EeM en formato A4 kaj pdf :

<http://esperanto-wallonie.be/eo/esperanto-en-marche-eo>

BIBLIOTHEQUE D'APE - BIBLIOTEKO

Respondeculo : Claude GLADY [Rue du Culot, 1 BE-5630 CERFONTAINE 071/644 916]

Vi povas mendi librojn al la RETBUTIKO DE FEL : http://www.esperanto.be/fel/but/lis_serchu.php

ASSOCIATION POUR L'ESPERANTO (A.P.E.)

COTISATIONS POUR APE EN 2017

- **MEM** : Pour être membre de APE : 10 €
- **BUL** : Pour recevoir les bulletins d'informations : 7 €
- **FAM** : Membre supplémentaire de la famille : 3 €

VIREMENT AU COMPTE IBAN : BE72 000 3258537 16 BIC: BPOTBEB1
de l'Association pour l'Espéranto (APE).

NB: Indiquer les raisons du versement. Exemple : MEM+BUL+2xFAM : 23 €

ABONNEMENT A LA REVUE « ESPERANTO-INFO » : 30 €

Vous pouvez payer directement au compte d'« ESPERANTO-INFO » (conseillé !)

Virement européen au compte IBAN: FR91 2004 1010 0811 9014 6B02 947

Indiquer : « NOM PRENOM pour Esperanto-Info adresse »

Vous pouvez aussi passer par le compte d'APE avec la mention « EoInfo »

Kodo	Universala Esperanto Asocio: UEA 2017		Ricevas
SA	Abono al la revuo "ESPERANTO" de UEA.	41 €	Revuon "ESPERANTO" sen membreco !
Kto	Abono al "KONTAKTO".	25 €	Revuon "KONTAKTO"
MJ	Membro UEA + "Jarlibro"	26 €	"JARLIBRON"
MJ-T	Membro kun Jarlibro ĝis 29 jaro inkl.	26 €	Revuon "KONTAKTO" kaj "JARLIBRO"
MA	Membro Abonanto (MJ + SA)	64 €	Revuon "ESPERANTO" kaj "JARLIBRO"
MA-T	Membro Abonanto ĝis 29 jaro inkl.	64 €	Kiel MA plus "KONTAKTO"
MG	Membro UEA+"Gvidlibro"	11 €	"GVIDLIBRO"
PT	Patrono de TEJO	78 €	la revuon "KONTAKTO" subteno al TEJO sen membreco
SZ	Societo Zamenhof	128 €	Mecenata subteno sen membreco.
DM	Dumviva membro de UEA (25xMA)	1.600 €	Dumviva MA

Bonvolu pagi al la konto de la peranto
por UEA-kotizoj en franclingva Belgio :

BE50 750-6373051-18

je la nomo de :

GLADY Claude Rue du Culot, 1
B-5630 CERFONTAINE

UZU LA KUNMETITAN ĜIRILON

BN: La "JARLIBRO" de UEA enhavas informojn kaj milojn da adresoj de UEA...

La "GVIDLIBRO" estas la "Jarlibro" sed sen la adresoj !

"KONTAKTO" estas la revuo de la junulara sekcio de UEA : TEJO

BN : Bonvolu nepre motivi vian ĝirilon per kodoj :

Ekzemple : MJ aŭ MA+Kto